Johann Wolfgang von Goethe,

# La bela lando

*tradukita de Karl Vanselow*

Ĉu konas vi la landon kun la flor'
De citronujoj kaj oranĝa or'?
Bluegas la ĉiel' kun milda vent',
La mirt', la laŭro staras en silent'.
Ĉu vi ĝin konas? For al ĝi,
Al tiu revo-land' sopiras mi.

Ĉu konas vi la domon sen kompar'?
Kolonoj brilas, brilas la ĉambrar',
Marmoraj dioj alrigardas nin
Demande: Kio malgajigas vin?
Ĉu vi ĝin konas? For al ĝi,
Al tiu revo-land' sopiras mi.

Ĉu konas vi la monton en nebul'?
La vojon serĉas tra nubar' la mul',
De la rokegoj tondras la torent',
Kaverne loĝas praa drako-gent'.
Ĉu vi ĝin konas? For al ĝi,
Al tiu revo-land' sopiras mi.

*Traduko de la Germana poemo "Mignon" de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Karl Vanselow *(∗1877-03-20 – †1959-12-28).*

*Arg-533-1064 (2010-04-05 14:20:53)*

*Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la poem-libreto "Nia Lingvo Esperanto, Elektita poezio por deklamo kaj kanto, Dua kajero de la unua serio, Dua Ardesia-eldono", verkita kaj eldonita de Karl Vanselow, sur la paĝo 60. Sub la teksto eatas tie indikita: (Laŭ "Mignon" de Goethe. Verkita nur por deklamo). - Pri la aŭtoro Karl Vanselow legeblas informoj en `http://eo.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow`.*

Johann Wolfgang von Goethe,

# Mignon

Kennst du das Land, wo die Zitronen blühn,
Im dunklen Laub die Goldorangen glühn,
Ein sanfter Wind vom blauen Himmel weht,
Die Myrte still und hoch der Lorbeer steht?
Kennst du es wohl? Dahin! Dahin
Möcht ich mit dir, o mein Geliebter, ziehn!

Kennst du das Haus? Auf Säulen ruht sein Dach.
Es glänzt der Saal, es schimmert das Gemach,
Und Marmorbilder stehn und sehn mich an:
Was hat man dir, du armes Kind, getan?
Kennst du es wohl? Dahin! Dahin
Möcht ich mit dir, o mein Geliebter, ziehn!

Kennst du den Berg und seinen Wolkensteg?
Das Maultier sucht im Nebel seinen Weg,
In Höhlen wohnt der Drachen alte Brut,
Es stürzt der Fels und über ihn die Flut.
Kennst du es wohl? Dahin! Dahin
Möcht ich mit dir, o mein Geliebter, ziehn!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22).*

*Arg-533-1063 (2010-04-05 14:35:18)*